

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj
ILEI

Jarkolekto 14

N-ro 3, 1984

Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 3, 1984

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090

Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

La lingvaj eraroj en tiu ĉi numero estas plene intencaj. Kiu konstatos ilin, povos nomi sin bona Esperantisto.

Ekde 1985 IPR deziras novan, ideoj-riĉan, paciencon, energiplenan redaktoron.

Li devas multe labori, sed li aŭ ŝi neniam ricevos ian kompenson!

Prezentproponojn bonvolu sendi al IPR.

Enhavo

1. D-ro Peter Zlatnar, unua honora membro de ILEI.
2. De Ŝkofja Loka ĝis Kungälv 1985 – IPR-raporto.
3. Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado H. Sonnabend.
4. Asemblea Konferenco de ILEI 1985 en Kungälv H. Sonnabend.
5. Alloga loko de nia 19-a Konferenco B. Andreasson.
6. Sugestopedio el Bulteno de la Amerika Asocio.
7. Lerni per Monato S. Maul.
8. Aranĝoj por geinstruistoj en KCE Cl. Gacond.
9. Perkomputera instruado ISAE, komputista sekcio.
- La loko de idiotismoj en Esperanto Bernard Golden.

D-ro Peter Zlatnar unua honora membro de I.L.E.I.

Ĉiu, kiu persone konas Peter Zlatnar certe pravigos mian opinion, ke li meritis tutan libron pri siaj pensado, planado, argumentado kaj agado je la bono de la Esperanto-instruado en la lernejoj. Kvankam li profesie ne estas instruisto, tamen batas en lia brusto koro de pedagogo.

Interalie li iam diris la ĉiam validajn parolojn:

“Nure lingva instruado ne sufiĉas. Krom tio, nia instruado ne nur devas esti didaktike plej moderna kaj laŭ sukceso plej efika, sed niaj instruistoj devas esti ankaŭ ideoj-konsciaj kaj teorie bone armitaj esperantistaj aktivuloj kiuj kapablas transplanti tiun konscion kaj idean valoron al siaj lernantoj kaj samtempe konvinkadi siajn profesiajn kolegojn pri la rolo kaj valoro de Esperanto.”

Koran gratulon, sinjoro kolego Zlatnar!

En la nomo de la estraro,
H. Sonnabend
prezidanto de ILEI

De Ŝkofja Loka ĝis Kungälv 1985

1. Enkonduki Esperanton kiel bazan lingvon ekde la tria lerneja jaro ĝis inkluzive la 4-a lerneja jaro po du horoj semajne.
2. Eklernado de fremdaj lingvoj je komenco de la kvina jaro.
3. La fremdlingva instruado estu akompanata de Esperanto kiel kompletiga lingvo.
4. Esperanto restu tiam la unusola lingvo, kiam aliaj fremdaj lingvoj por gelernantoj ial ne estas bezonataj.
5. Ankaŭ instruistoj akiru la instrukapablon pri Esperanto en universitatoj aŭ altlernejoj.

“Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado” – estis la temo de la 18-a konferenco en Skofja Loka en Slovenio/Jugoslavio kaj la nomitaj kvin punktoj apartenas nun al ĉefa programo de ILEI kies realigo validos ĝis Esperanto estos plene integrita en la sistemo de fremdlingva instruado.

La konferenco substrekis sian opinion, ke ĝi ne kontraŭas la instruadon de fremdaj lingvoj en niaj lernejoj ĉar ĝi konscias, ke Esperanto ne simple anstataŭas la nunan sistemon sed sendube kompletigos ĝin.

Tamen, la Internacia Lingvo signifus ŝlosilan bazon pli en landoj kies lingvoj ne apartenas al lernejoj studobjektoj ekster iliaj limoj. Tion substrekis prof. France Pivec, vicprezidanto de la Komitato pri Edukado kaj Klerigado de Respubliko Slovenio.

En siaj salutvortoj li i.a. diris:

“Sendube estas Esperanto, laŭ siaj politikaj kaj humanismaj konceptoj tre proksima al Jugoslavo. Konsiderante nian internacipolitan orientiĝon, ni povus antaŭvidi interesan penetradon en la Trian Mondon. Tamen la ŝlosilo ankoraŭ troviĝas en la propraj pordoj — Esperanto devas unue fariĝi mensa propraĵo de niaj junaj generacioj kaj samtempe konsiderinda pliriĉiĝo de ilia kultura horizonto.

Tiucele estas necese pli eluzi la ekzistantajn eblecojn por ĝia disvastigo. Antaŭ ĉio ĝi devas penetri en klerigajn fakajn tavolojn jam dum ilia faka prepariĝado en mezgradaj kaj altaj lernejoj.

Ke tiaj vortoj ne esprimis kutimajn ĝentilaĵojn, pruvis interesa kunveno en la ministerio pri edukado en Ljubljana la 16-an de aŭgusto 1984 je la 10-a ĝis la 12-a horoj. La protokolon skribis P. Zlatnar, prezidanto de LKK:

Partoprenintoj: Gastiganto estis vicministro prof. France Pivec. – Prezidanto de LKK: Zlatnar Peter. – Prezidanto kun estraranoj de ILEI: rekt. Helmut Sonnabend, prof. dr. M. Dazzini, prof. B. Andreasson, prof. A. Hurčak. – Rerezentantoj de ILEI-sekcioj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Italio, Hungario, FR Germanio, DR Germanio, Pollando, Svedio kaj Jugoslavio.

Je la nomo de la ministro por edukado kaj klerigado de Soc. Resp. Slovenio, la vicministro prof. France Pivec akceptis la partoprenantojn kaj gastigis ilin per brando, vino, fruktsukoj, sandviĉoj kaj kukoj. Post enkonduka bonvenigo li klarigis la organizan strukturon, laboron kaj kompetentecojn de Respublika Komitato (Ministerio), por pli facile interkompreni en la kadro de la ekzistantaj eblecoj dum la diskuto pri la principaj kaj konkretaj demandoj ĉirkaŭ la ronda tablo.

La prezidanto de LKK enkonduke proponis la kadron de la interparolo, kiu prezentu la situacion kaj la problemaron en la fremdlingva instruado kaj aktualan lokon de Esperanto en lernejoj.

La diskuton komencis la ĝenerala sekretario de ILEI, prof. dr. Mario Dazzini, prezentante la laboron kaj taskojn de tiu internacia organizaĵo kiu ankaŭ kunlaboras kun Unesko en la kadro de la aliĝintaj neŝtataj organizaĵoj.

Sekvis la raportoj, informoj kaj opinioj de ĉiuj partoprenantaj landaj reprezentantoj kun aktiva atento kaj opini-interŝanĝoj kun vicministro Pivec kaj aliaj ĉeestantoj.

Post la ĝenerala, tre vigla, duhora debato kaj komparado de situacioj en la unuopaj ŝtatoj, estas konstatita deviga lernado de unu fremda lingvo kiu estas ĉu angla, ĉu rusa. Kiel dua aŭ tria lingvo aperas franca, germana kaj aliaj lingvoj (hispana, najbara, latina

k.a.). Esperanto povas esti ĉie instruata kiel fakultativa fako kaj kiel libera aktiveco.

Surbaze de supraj konstatoj, prezentiĝas la reala ebleco kunordigi la instruadon: laŭprograme, leksike, organize planita kontaktado kun enhave interesa praktika aplikado en la kadro de ĝisnunaj kontaktoj kaj ties plularĝigado.

La prezidanto de ILEI, rektoro Helmut Sonnabend proponas sekvi kaj utiligi la spertojn de la 3-a Maribora Kunordiga Konferenco, kiun partoprenis ankaŭ, kiel oficialaj observantoj, la reprezentantoj de ministerioj el kvin najbaraj landoj de Jugoslavio. Tiu interkonsentis organizi eksperimentan instruadon de Esperanto en po kelkaj elementaj lernejoj de siaj landoj kaj surbaze de atingitaj rezultatoj prepari novan samspecan konferencon, kiu pluen evoluigu la ĝisnunan kunlaboron ĝis fina atingo de tiucela interŝtata konsento.

La gastiganta vicministro F. Pivec esprimis pretecon de la Ministerio ripeti la iniciaton kunvenigi la reprezentantojn de ministerioj por lernejoj, kunlabore kun la Esperanto-organizaĵoj el interesitaj, precipe najbaraj landoj.

La prezidanto de ILEI siaflanke transprenis la respondecon entrepreni ĉiujn necesajn antaŭpreparojn por sukcesigi tian konferencon kun la ŝtatoj kie ekzistas objektivaj kaj subjektivaj eblecoj.

Sekve de la diskutadoj, rezonadoj, konkludoj, decidoj, kaj rezolucio estas nun postulata de estraro kaj sekcioj de ILEI:

1. La Ligo bezonas klaran bildon pri la sistemo de fremdlingva instruado kunlige kun la ceteraj studobjektoj — laŭeble tabelare,
2. tre gravas semajna horarplano kiu inkluzivas la unuopajn fakojn, jen por la 3-a kaj 4-a klasoj,
3. sciigu vian proponon kiel enhorariĝi Esperanton kiel bazan lingvon,
4. kiu instruas Esperanton en la elementa klaso, sendu sian laborprogramon inkluzive la amplekson de la vortmaterialo (celante aktivan kaj pasivan konojn),
5. kiu instruas al aliaj ŝtupoj, faru la samon (la materialo estos en la sekvo bezonata).

Bonvolu nun bone atenti! – La vicministro pri edukado kaj lernejoj, s-ro F. Pivec, estas preta ne nur akcepti la materialon sed ankaŭ transpreni kunordigan rolon kaj prezenti nian laboron al siaj ministraj kolegoj de la aliaj jugoslavaj respublikoj.

La laborvico: Sendu vian materialon al la prezidanto de ILEI. Li kompilos ĝin. Poste d-ro Zlatnar tradukos ĉion en slovenan lingvon kaj post preparado transdonos la rezultojn al la ministro.

Plej malfrue ĝis Kristnasko tiu ĉi parto de nia laboro devas esti finita. Sed amaraj spertoj ĝis nun dubigas min, ĉu ni kapablos fari paŝon antaŭen. Tamen jam tri sekcioj plenumis siajn taskojn: la franca, sveda, kaj germana.

Ĝeneralaj kaj konstantaj laboroj

1. La sekcioj preparu duonjaran raporton al siaj ministerioj pri la aktivecoj en la lernejoj, apogante sin sur la Unesko-Rezolucio de 1954: "Notas, ke pluraj ŝtatoj-membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas ĉiujn ŝtatojn-membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo."
2. Preparu planon por analiza observado de Esperanto-instruado en lernejoj por ĝia progresiva kaj konstanta evoluo.
3. Al la redakcio de IPR estu sendataj raportaj, analizaj kaj informaj kontribuajoj por ĝia plua aktualigo kaj pli ofta eldonado.

Ĝis la jubilea jaro:

1. Prezento de internacia instruprogrameco por ĉiuj lernejoj ŝtupoj laŭ jena skemo:
 - a) vortamplekso;
 - b) lingvaj/gramatikaj elementoj kaj strukturoj;
 - c) lingvaj aplikadoj kaj -kontaktoj, abundaj legaĵoj inkluzive metodikaj/didaktikaj indikoj kun instruceloj kaj kulturaj aspektoj;
2. Internacia konkurso: verkistoj-instruistoj skribu legaĵojn por infanoj kaj gelernantoj;
3. Lertaj ĝeinstruistoj prezentu siajn instruilaĵajn modelojn;
4. Prepari kaj ebligi al kvin infanoj/junuloj el sia lando partopreni al Internacia Lerneja Semajno en Grésillon dum la paska tempo 1987.

Rilatoj inter UEA kaj ILEI:

Ĉar ili estas en plena distordeco. ILEI nun provos ordigi la rilatojn, preparante komunan programon, klare dividi la diversajn taskojn inter ILEI, UEA kaj TEJO. Por diskuti ĉiujn demandojn, ILEI jam nun invitas al komuna estrarkunsido por la bono de Esperanto.

PERKOMPUTILA INSTRUADO

«Internacia Komputado» (kvaronjara revuo por ĉiuj, kiuj interesigas pri komputado, ĉu hobie, ĉu profesie), aperigos tematikan numeron pri utiligo de komputiloj en la lernado, instruado. La tiutemajn artikolojn bonvolu sendi laŭeble ĝis jarfino, sed maksimume ĝis la 31a de januaro 1985 al la redakcio: Komputista Grupo de HEA, H-1368 Budapest, Pf. 193, Hungario. Same tiu adreso liveras senpagan prov-ekzempleron por ĉiuj, kiuj interesigas pri ĝi.

Sugestopedio

El «Bulteno de la Amerika Asocio de E-instruistoj» (Aprilo 1984)

Lastan novembron okazis en Halásztelek, Hungario, superintesa kvin-taga kurso uzanta la metodon «sugestopedio» de la bulgara doktoro Georgi Lozanov. Partoprenis 40 gelernantoj. Jen kelkaj karakterizoj de la kurso, laŭ unu el la gvidantoj:

Deviga kunloĝado — Studhoroj po 45 minutoj kun 15-minutaj paŭzoj — Tuttaga programo (10 studhoroj tage, kun 118 minutoj da posttagmeza ripozo) — Oni ne uzas tabulon kaj ne ekzistas hejmaj taskoj — Diversaj kaj spertaj instruistoj — Multaj sorĉiloj (anteno, tamburo, bumerango, sloganoj, rostita fiŝo, muziko, kretena lupoj, ronkado, papago ktp) — Sistemo de premioj — Neniu rajto malfruiĝi — Ĉiu minuto planita (oni preparadis dum pli ol unu jaro).

Kion oni instruis dum tiuj kvin tagoj? La tutan gramatikon — Minimume mil radikojn — Kompreni rapidan parolon kaj la prononcadon de diversnaciaj esperantistoj — Elformi parolkapablon (plej grava celo) — Esti esperantisto (“verdigo”).

Laŭ la verkisto, ĉi tiu metodo estas influo sur homojn por atingi konkretan celon per volo, kredo, kaj laboro. Estas falsa imago ke la metodo konsistas nur el komfortaj foteloj, mola tapiŝo, kaj trankviliga aŭ eĉ dormiga muziko. Sugestopedio povas funkcii eĉ sen tio.

ILEI tre interesigas pri la metodo. Kiu havigos pli detalajn informojn?

ILEI aŭspicias jenajn pedagogiajn aranĝojn kaj rekomendas ilin al siaj gekolegoj:

Julio 29 – aŭgusto 3

- Moderna Cseh-metodo: La aŭdvida instruado de Esperanto. Instruos Claude Gacond.

Aŭgusto 12–17

- Moderna Cseh-metodo: La per-teksta instruado de Esperanto. Instruos Claude Gacond.
- Tradukseminario por germanlingvanoj, unua semajno. Instruos Dirk Willkommen.
- Aŭgusto 19–24
- Tradukseminario por germanlingvanoj, dua semajno. Instruos Dirk Willkommen.
- Tradukseminario por franclingvanoj. Instruos Georges Lagrange.

Pedagogiaj Semajnfinoj

Partoprenkostoj: kiel por la Studaj Semajnfinoj. Petu la detalan informilon.

Februaro 16–17: Moderna Cseh-metodo – La perbilda instruado de Esperanto. Instruos Claude Gacond.

Marto 23–24: Moderna Cseh-metodo – La aŭdvida instruado de Esperanto. Instruos Claude Gacond.

Novembro 16–17: Moderna Cseh-metodo – La per-teksta instruado de Esperanto. Instruos Claude Gacond.

Kontaktadreso: Ĉiujn korespondaĵojn direktu al Kultura Centro Esperantista, poŝtfako 771, rue des Postiers 27, CH-2301 La-Chaux-de-Fonds (Svislando).

Servopretas: Claude Gacond, Stefano Keller, Herbert Mayer, Michel Frésard.

Lerni per «Monato»

Stefan Maul

Unu el la plej interesaj revuoj en Esperanto sendube estas «Monato», internacia magazino sendependa. Por ĉiu lerninto de la internacia lingvo, ĝi alportas abundan legaĵon el la internacia vivo, el ĉiuj kampoj de l' moderna mondo. Ĉi tiu unika magazino estas unika ankaŭ laŭ ĵurnalistikaj kriterioj: aperas en ĝi nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj de indiĝenaj aŭtoroj el la diversaj landoj, se temas pri raportoj kaj informoj el iuj landoj. (Tial mi rekomendas al instruistoj, kiuj traktas en lernejo temojn de gazetaro kaj komunikado, ĉe tiu okazo ankaŭ prezenti la alternativon de «Monato». Krome oni bone povas demonstri per «Monato» la eblecojn, kiuj praktike donas internacia lingvo.)

Nu, ĉi tiu prestiĝa revuo alportas utilon ne nur al perfektaj esperantistoj. Ankaŭ homoj, kiuj finis kurson, multe povas profiti per «Monato», ĉar legante ĝin ili el-lernas la lingvon, ne tiun de lernolibroj kun limigitaj temoj, sed la ĉiutagan lingvon de politiko, ekonomio, kulturo, tekniko, arto kaj de praktikaj aferoj. «Monato» havas multajn diversajn rubrikojn ĝis kuir-receptoj kaj paĝoj por infanoj, junularo kaj hobiaj. Kaj nelaste per la ĉiunumera granda kruc-enigmo oni lernas multajn vortojn, kiel konfirmas eĉ longjaraj esperantistoj.

Matura lingvo

Kontraste al tielnomataj “facilaj revuoj” «Monato» tamen ne havas reduktitan vort-trezoron kaj pro tio ankaŭ ne devas eviti komplikajn kvankam interesajn temojn. Problemo de “facilaj revuoj” estas, ke facile kaj rapide abonanto enuas pro ties limigita enhavo (simile kiel ĉe lernolibro). Per «Monato» oni povas paŝon post paŝo progresi per kompleta revuo kun kompletaj enhavo kaj lingvo, do vere matura lingvo. Jam la komencinto trovas interesajn erojn ne tro longajn, la progresinto baldaŭ atakos pli ampleksajn artikolojn

kaj kiel maturiĝinto tamen ne devos ŝanĝi la revuon, ja li evoluos kun la lingvo-evoluo, kiun spegulas «Monato» kiel neniu alia revuo. Cetere, la lingvo de «Monato» ne estas vere komplika aŭ malfacila — komplikaj foje estas temoj. Sed en enketo ne malpli ol 18 % de l' abonantoj diris, ke la lingvaĵo de «Monato» estas facila! Atestas tion ankaŭ la fakto, ke por ekzamenoj pri lingva kapableco oni ofte uzas tekstojn el «Monato».

Aktuala kurs-materialo

Se oni do sendube povas bonege ellerni la lingvon individue per «Monato», kial ne ankaŭ uzi ĝin por kursoj? Multaj kursgvidantoj jam faras tion, kun tre bonaj spertoj. Estas ja evidente, ke en ĉiu numero de «Monato» troviĝas abunda interesa, aktuala ekzerco-materialo. Oni povas uzi ĝin en multaj manieroj: traduki, referi, diskuti artikolojn; kune plenigi krucenigmon; igi du personojn legi intervjuon, rolante kiel ĵurnalisto kaj intervjuato, dum la aliaj aŭskultas (kaj poste re-raportas); skribi leteron al la redakcio pri iu artikolo; fari ludon prezentitan en la rubriko por infanoj aŭ hobio-ktp. Bona instruisto kaj kursestro facile trovas multajn eblecojn, utiligi la magazinon.

Ne en ĉiuj kazoj necesas, ke ĉiuj kursanoj mem havu la revuon, kvankam jam establiĝis rondoj, kiuj aparte okupas sin per «Monato». Minimume tamen ĉiu kursgvidanto konatigu siajn kursanojn dum kaj fine de elementa kurso kun «Monato», ekzemple donacante al ĉiu kursfine malnovan ekzempleron. Se vi donas ateston kun notoj, eble premio por la plej bona kursano povas esti jarabono al «Monato».

Ideala lern-materialo «Monato» kompreneble estas por progresigaj kursoj. Tamen por tio ne uzu malnovajn, sed aktualajn numerojn. (Por tiaj kursoj, cetere, la eldonejo donas konsiderindajn rabatojn. Petu informojn pri tio ĉe: «Monato», Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.)

Ili forkuras...

Ni ĉiuj konas la kutiman plendon: kurso finita, ĉio finita. La kursanoj forkuras kaj rapide perdas intereson pri Esperanto, ĉar nur tre malmultaj ŝatas membriĝi en klubo aŭ asocio; ili ne volas movad-

umi. Ili lernas la lingvon ja por utiligi ĝin, kaj se post kurso ili ne trovas utilon, ili forlasas la movadon kaj Esperanton.

Ankaŭ ĉi-rilate «Monato» estas bona helpo: ĝi ne estas movada revuo, sed ĉiutema aktuala magazino, kiu utilas al homoj kun intereso pri internaciaj aferoj. Ne malofte la redakcio ricevas leterojn, per kiuj abonantoj komunikas: "Dank'al «Monato» mi revenis al Esperanto". Kvankam do per «Monato» oni eble ne povas teni homojn en la movado, minimume oni povas teni ilin ĉe Esperanto, kaj tio jam valoras la penon, konigi al ĉiuj kursanoj ĉi tiun magazinon. Ili estos dankaj al kursgvidanto, kiu montras al ili vojon, praktike utiligi la lernitan lingvon.

Asemblea-Konferenco de ILEI 1985 en Kungälv/Svedio

19-a Konferenco de 22-a ĝis 29-a de Julio

Konforme al la statuto, artikolo 7, mi petas nomi al mi la delegitojn, kiuj formos dum la konferenco la asembleon. Al ĝi apartenas la estraro. La asembleo pridiskutas la laboron faritan de la estraro kaj de la komitato, kaj la proponitajn gvidliniojn por la venonta tri-jara periodo, ... , elektas la estraron.

La ŝlosilo por la konsisto de la Asembleo estas:

- ekde 5 membroj: unu delegito;
- de 6 ĝis 15 membroj: du delegitoj;
- de 16 ĝis 45 membroj: tri delegitoj;
- por ĉiu plia 15 aŭ parto de 15: unu plia delegito.

Sed bonvolu atenti: La bazo por fiksi la nombron de delegitoj estas la pagita kotizo por la antaŭa jaro!

Pretaj por denove kandidatiĝi estas la ĝenerala sekretario, d-ro Mario Dazzini, kaj la estrarano pri financoj, s-ro B. Andreasson.

Vakantaj estas la postenoj:

1. de la prezidanto,
2. de la vicprezidanto,
3. de la sekretario.

La estraro proponas kiel vicprezidanton, s-ron Josef Marević, Jugoslavio, kaj kiel sekretarion s-ron Andrés Martín Gonzáles, Hispanujo/Malaga.

La prezidanto ne plu kandidatiĝos. Sed oni estu singarda! Laŭ miaj longjaraj spertoj mi konsilas proponi kandidaton por la prezidanteco, kiu ĝuas ankaŭ la konfidon de niaj (iamaj) socialismaj sekcioj kiel ekz. la UEA-estrarano pri kulturo kaj edukado, la gvidanto de la pedagogia komisiono. Kaj ŝi aŭ li estus plene indiferenta rilate la eventojn de 1974!

Mi atendas nomojn de delegitoj kaj proponojn ĝis la unua de Februaro 1985. Ĉiu membro de ILEI posedas la rajton kandidatiĝi, sed prefere oni interkonsentu kun sia sekcio. *H. Sonnabend*

Alloga loko de nia 19-a konferenco

Bertil Andreasson

Kungälv (Reĝa rivero) estas malgranda sveda urbeto kun proksimume 13 000 enloĝantoj. La urbo situas en la okcidenta parto de Svedujo 25 km norde de Gotenburgo ĉe la rivero Göta älv ĝuste tie, kie la rivero disiĝas en du riverbranĉojn.

La urbo estis laŭ la sagaa literaturo fondita dum la 10-a jarcento kelkajn kilometrojn pli sude de la nuntempa Kungälv. La urbo tiam havis la nomon Kongahälla. Plurfoje la urbo estis ruinigita; i.a. vendaj vikingoj elrabis ĝin en 1135. En 1612 oni translokiĝis la urbon al la hodiaŭa loko, ĉar tie troviĝis la fortikaĵo Bohus.

Dum la 14-a jarcento la plej suda parto de Norvegujo estis ĝuste ĉi tie kaj la norvega reĝo Hakon la 5-a ordonis la konstruadon de kastelo kaj fortikaĵo por kontroli tiun parton de sia lando. Unue oni konstruis la fortikaĵon el ligno, sed meze de la 15-a jarcento la tuto estis anstataŭigita per ŝtonaj konstruaĵoj. La fortikaĵa zono ekster la ringmuregoj kun kanonaj ĉambroj, remparoj kaj kazernoj estas konstruita dum la 16-a jarcento. Oni diras, ke Bohus estis unu el la plej grandaj, plej fortikaj kaj plej masivaj kasteloj de la tuta Nordio.

Dum la 14-a kaj 15-a jarcentoj la fortikaĵo funkciis kiel loĝejo por reĝaj personoj kaj kiel malliberejo, ankaŭ por reĝaj personoj. Ekde la lasta parto de la 15-a jarcento Danlando reĝis super Norvegujo kaj tiam la danoj estiĝis posedantoj de la kastelo Bohus. La fortikaĵo estis sieĝita 14 fojojn sed neniam konkerita.

Inter Danlando kaj Svedujo okazis multaj bataloj dum la 17-a jarcento. Speciale dum la nordia sepjara milito 1563–1570 la fortikaĵo plurfoje estis sieĝita de svedoj. La fino de la multaj bataloj inter svedoj kaj danoj estis la paciĝo de Roskilde en 1658, kiam Svedujo

de Danlando ricevis grandajn landpartojn kaj i.a. la fortikaĵon de Bohus. Post tiu tempo la kastelo restis sveda.

Dum la sveda periodo la fortikaĵo funkciis kiel garnizonejo kaj malliberejo por krimuloj kaj militkaptitoj. La kastelo ne plu situis ĉe la landlimo kaj ĝia graveco malkreskis. La kastelo komencis ruiniĝi. En 1786 la garnizono translokiĝis al nova ejo kaj la kastelo ankaŭ ĉesis kiel malliberejo, kaj dum la preskaŭ 200 sekvantaj jaroj la fortikaĵo ruiniĝis. Hodiaŭ restas nur partoj de la iama impona kastelo kaj el kvar turoj restas nur unu, *Fars hatt* (La ĉapelo de patro), sed la restaĵoj estas multe vizitataj kaj estas bela memoraĵo de la nordia historio.

Al tiu loko oni translokiĝis la urbon Kungälv dum la 17-a jarcento. Kaŭze de la mallarĝa spaco inter la rivero kaj la monto Fontin, la urbo disvastiĝis laŭlonge de nur unu strato, la *Västra gatan* (okcidenta strato). Centro de la urbo fariĝis la Granda Placo kun la preĝejo, la urbodomo kaj la gastigejo.

Dum la 18-a jarcento, kiam la fortikaĵo de Bohus perdis sian gravecon kaj la soldatoj translokiĝis, tiam la urbo ankaŭ perdis sian gravecon. La komercistoj anstataŭe ekloĝis en la kreskanta havenurbo Gotenburgo. Restis preskaŭ nur terkulturistoj kiuj flanke de sia ĉefa profesio ankaŭ estis metiistoj kaj komercistoj. Meze de la 18-a jarcento Kungälv havis jam nur 500 enloĝantojn. La urbo dormadis dum pli ol 100 jaroj, kaj dum la 19-a jarcento Kungälv estis vera idilio. Oni eksportis ĉefe grenon, lignaĵon kaj brikojn. La urbo malrapide kreskis. Je la fino de la 19-a jarcento la industrioj venis al Kungälv. En 1876 oni komencis produkti vitron kaj en 1888 nova fabriko grandskale ekbakis kekson, kaj daŭrigas ankoraŭ aktuale. Sekvis aliaj industrioj. La urbo kreskis kaj en 1920 ĝi nombris 2 000 enloĝantojn.

La loĝospaco plu ne sufiĉis por ĉiuj kaj la centro de la urbo estis translokata okcidenten. Dank'al tio la malnovaj lignaj domoj ankoraŭ situas neŝanĝitaj laŭlonge de la *Västra gatan* kaj ĉe la Granda Placo kaj havigas al la urbo specialan kaj unikajn ĉarmon.

Sur la monteto de Fontin nun troviĝas la Nordia popolaltlernejo. Ĝi estas fondita en la jaro 1947 kaj havas nordiajn geinstruistaron kaj gelernantaron. La estraro de la lernejo konsistas el personoj de ĉiuj

nordiaj landoj, i.a. la nordiaj konsuloj en Gotenburgo. En tiu ĉi bele lokita kaj taŭga lernejo okazos la 19-a Internacia Konferenco de ILEI, de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1985. La lernejo havas bonajn konferencajn salonojn, belan manĝejon kaj komfortajn apartajn loĝdomojn sur la monteto.

Kungälv hodiaŭ disponas bonajn aŭtobusajn trafikligojn kun Gotenburgo. Rapida kaj larĝa aŭtoŝoseo kunligas la du urbojn. Al Gotenburgo oni facile vojaĝas per trajno, aviadilo aŭ ŝipo el la tuta mondo:

Do: bonvenon en Kungälv 1985!

Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado

Helmut Sonnabend

(Parolado okaze de la 18-a konferenco de ILEI)

Du informojn mi deziras meti je la komenco de miaj eksplikoj:

1. Ĉirkaŭ 20 000 infanoj en Germanujo lernas Esperanton. Ili estas instruataj de 630 instruistoj.
2. 5 429 infanoj en Jugoslavio lernas Esperanton en 171 lernejoj. Ambaŭ informoj apartenas al du epokoj de la preskaŭ centjara historio de Esperanto.

La unua informo estas el la jaro 1922 kaj la duan ni datigu por la lerneja jaro 1959/1960. Aldone estas menciinde, ke la nombro estas entenata en samjara enketo. Sendube via lando rangis je la pinto. 27 landoj estis siatempe respondintaj. 26 aliaj landoj informis pri 7 708 gelernantoj en entute 175 lernejoj. La komparo laŭ procentoj montras pli klaran bildon: 41,3 % de la infanoj el 49,49 % de la enketitaj lernejoj apartenis al Jugoslavio. Ĉi-loke permesu al mi malgrandan imagan citaĵon kaj tuj poste iamanieran tipan sintenon de instruista unuiĝo en Germanio.

La citaĵo: “«Jes, la cirkonstancoj ŝanĝiĝis», diris la diablo, kiam li devis raport: pri la malkreskado de Esperanto-instruado en la lernejoj.”

Nun la tipa sinteno. Sub la surskribo «Ĉeflernejo aŭ reveno al Popollernejo», la raportanto de iu fakjurnalo skribis: “Okaze de ‘Angla lingvo-fakkunveno’ de la bavara geinstruista unuiĝo je la 24.3.1984 en Nurnbergo la 150 delegitoj postulis ankaŭ por la bavaraj ĉeflernejoj la instruadon de la angla lingvo kiel devigan fakon en ĉiuj lernejoj ŝtupoj. Akre kritikis la reprezentantoj el scienco kaj pedagogio la redukton de la angla lingvo al nuraj elekto-devo-fakoj. La reputacio de la ĉeflernejo kiel ĝenerala klerige plu-

kondukanta lernejo staros aŭ falos kun la rekono/nerekono de la angla lingvo kiel fundamenta fremdlingvo por ĉiuj gelernantoj. En plena konscio pri la interplektado de vivorilatoj, pri la evoluado de Eŭropa unuiga pensado, pri la konstante kreskanta postulita fleksibleco en ĉiuj laborkampoj, estas tial necese, konservadi la anglan lingvon senkompromise, kiel devigan gravan fakon en ĉeflernejoj.

Momente ni lasu la pli enkondukajn rimarkigojn, sed permesu al mi diri kelkajn personajn vortojn. Estis la jaro 1970, kiam mi dum la paskaj tagoj vizitis Maribor. Tie okazis la Tria Kunordiga Pedagogia Konferenco. Siatempe mi estis vicprezidanto de ILEI kaj mi deziris studi viajn labormetodojn por organizi kvinlandan lernejan eksperimenton. Sekvis pluraj ĉiujaraj konferencoj en la sama urbo. Viaj metodoj kaj la irado de la eksperimento kuraĝigis min, organizi similan eksperimenton en nia regiono.

Via fama tradicio rilate Esperanton forte influis la evoluon de la Lingvo Internacia ne nur en Eŭropo, kaj mi devus nomi multajn bonegajn esperantistojn en Jugoslavio kiuj metis multajn gravajn impulsojn kaj sugestojn. Aparte restas por mi ĉiam tri personoj: Prof. Rudolf Rakuša, Ludevik Prebil kaj — feliĉe inter la vivantoj — Peter Zlatnar, de kiu mi ĉiam havas la impreson, ke li estas plensanga pedagogo. Mian sinceran respekton kaj estimon al la jugoslava Esperanto-Movado!

Sed ni nun revenu al nia temo. Mi intencas interalie ankaŭ alparoli niajn jugoslavajn neesperantistajn gekolegojn kaj inter ili esence tiujn instruantajn fremdajn lingvojn. Certe estas Esperanto kiel Lingvo Internacia ne ia superflua apendico, detranĉenda por ne ĝeni la sistemon de la fremdlingva instruado. La instruistoj instruantaj Esperanton ne nur deziras kunlaboron, sed ankaŭ krei tian interkonsenton utilan por la fremdlingva instruado. Ni ne intencas iel malgrandetigi laboron kaj sukcesojn de la moderna fremdlingva instruado sed ni plene kongruas kun ties celoj ebligi lingvan komunikadon inter la homoj. Jam Esperanto estas instruata de gekolegoj ankaŭ instruantaj fremdajn lingvojn. Tamen, por skizi iom pli klaran bildon pri la evoluo de Esperanto, mi nomas kelkajn gravajn historiajn eventojn.

Prezentite en 1887, ĝi tre rapide disvastiĝis — mi nur memorigas vin pri la 20 000 infanoj en Germanio, lernintaj Esperanton. Jam en

1922 la Pedagogia Internacia Konferenco estis kunvokita en Ĝenevo. Ĝi okazis de la 18-a de Aprilo ĝis la 20-a en la palaco de la Ligo de Nacioj. Partoprenis centoj da instruistoj, lernejestroj el 28 landoj, partoprenis 16 registaraj reprezentantoj kaj multaj ĵurnalistoj. La konferenco okazis pro pluraj mirindaj fenomenaj eventoj:

- La unua lernolibro pri Esperanto estis eldonita de ĝia aŭtoro, d-ro Zamenhof. Ĝi estis nur 40-paĝa broŝureto kun aldonita vortaro kaj aparta ekzercaro. Ili kune fariĝis la netuŝebla fundamento de la Lingvo Internacia.

- Se ni volas, ni donu por tio la respondecon al la rusa cenzuro, kiu donis precize je la 21.5.1887 la permeson aperigi la libreton. Jam ĝis Decembro 1887 aperis pola, franca, germana eldonoj.

- En 1889 la adresaro jam enhavis mil nomojn.

- En 1905 okazis la unua kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer. Ni lasu flanken la sentojn kaj kortuŝitecojn kiuj trafluis la homojn, kiam ili ekspertis, ke ili komprenas unu la alian.

- Pasis 25 jaroj kaj oni festis la arĝentan jubileon de la Lingvo Internacia en Krakovo. Estis la jaro 1912. En Aŭgusto 1912 la Centra Oficejo registris 1 837 esperantajn librojn, interalie 316 tradukaĵojn, 78 originalojn literaturajn kaj 29 antologiojn; klasigitaj estis 115 sciencaj temoj, 114 vortaroj kaj 456 lernolibroj en 31 lingvoj. Observantoj taksis ĉirkaŭ 40 000 parolantojn de Esperanto. La multaj faktoj impresis profunde la konferencan kaj observantojn kaj jam en la tria kunveno leviĝis unu el la plej famaj kaj ĝis hodiaŭ kun konstanta reguleco revenanta demando:

Ĉu Esperanto influas la lernadon de fremdaj lingvoj?

Kaj jen ni aŭdu kaj aŭskultu la unuan aŭtentan raporton de d-rino Alexander Fisher, lernejestrino en Bishop Auckland. Kaj jen ankaŭ rimarkinda konstato: estis la Brita Registaro, kiu subvenciiis eksperimenton. Citaĵo el *Historio de Esperanto* de Edmond Privat: “Oni elektis du paralelajn klasojn de knabinoj dekdujaraj A kaj B. Dum la unua jaro oni instruis Esperanton al klaso A kaj la francan lingvon al klaso B. Dum la dua jaro, A komencis lerni la francan, kaj B daŭrigis ĝin. Dum la tria jaro ambaŭ estis kunigitaj en unu. Kio okazis nun? La lernintinoj de A superis la klason en franca lingvo, kvankam tiu ĉi lernis tri jarojn anstataŭ du.” Kial? Privat

mencias konatan pedagogian regulon: de simpla al malsimpla. Lerni Esperanton estas pli facile ol lerni la francan. Do, unue lerni Esperanton kaj poste, je granda profito, la francan. Aplikebla por ĉiuj fremdaj lingvoj!

Se vi konsentas, ni konstatu ke Esperanto ne foruzas tempon, sed tute kontraŭe gajnas tempon, kaj ankaŭ ke Esperanto signifas helpas solvi didaktikajn kaj metodikajn demandojn.

En la senco de mia temo mi notas du plusajn punktojn favore al Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado! Ĉiu pedagogo pri lingvoinstruado scias, ke infanoj bone regantaj la propran gepatran lingvon ĉiam pli facile lernas fremdajn lingvojn ol iliaj kamaradoj havantaj kelkajn problemojn. Do, ankaŭ la demando unu tagon antaŭe starigita en la sama konferenco, tuŝas fremdajn lingvojn: "Ĉu la instruado de Esperanto iel influas la lernadon de la gepatra lingvo?" La spertintoj sen hezito jesadis la demandon. Ili konstatis ke ĝuste la regula, logika konstruo kutimigas la infanojn al gramatikaj komparoj: la sufiksoj helpas al tio, ĉar ili faciligas la klarigon de la sinonimoj, le elekton de la ĝusta vorto. Esperanto mem estas la fonetika kurso kaj utilas al la elparolo kaj ortografio. Jen alia profito por la instruado de fremdaj lingvoj.

Pasis ekde tiam multaj jaroj, la dua mondmilito ŝajne sufokis la ideon de Lingvo Internacia. Ni konas la lukton kiu gvidis al la internacia rekono de Esperanto en la jaro 1954 en Montevideo, kiam prof. Lapenna konvinkis la plimulton de la ĝenerala kunveno de Unesko. Mi citas unu frazon el la tiama rezolucio: "Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksiĝi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo."

Tri jarojn poste diris d-ro Zlatnar en unu prelego: "Ne vidi en ĉio ĉi bazan ideon edukon programon en nia movado kaj grandegan firmiĝon de Esperanto en internacia socia vivo kaj kreskantan rolon de Esperanto kiel socia faktoro, signifas ne vidi la pozicion de Esperanto en la momento favore maturiĝanta. Ni renkontis kaj renkontas survoje potencajn, influajn kaj same fervorajn aliancinojn. Ni akordigu niajn planojn laŭ komuna programo kaj dividu la taskojn laŭ unuopaj sektoroj de socia vivo kun plena konfido kaj kun plena

respondeco." Kaj li samtempe avertis: "Neglektante ilin, ni ne povas pretendi, ke ili respektu nin!"

Loko kaj preciza tempo de tiuj ĉi vortoj estis la Somera Pedagogia Semajno de 26-a Julio ĝis 1-a Aŭgusto 1957 en Kranjska Gora. La temo de d-ro Zlatnar estis "Edukaj celadoj en instruado de Esperanto en lernejoj." Nomoj kiel Rakuŝa, Rotkvić, Neergaard, kaj Vukmanoviĉ desegnis esperplenan estontecon de la Lingvo Internacia.

La serena agordo ankaŭ esprimiĝis per Petar Vukmanoviĉ: "La internacia lingvo Esperanto estas instruata en multaj lernejoj en nia lando. La nombro de tiuj lernejoj konstante kreskas. Ankaŭ kreskas la nombro da spertaj geinstruistoj kaj nombro da gelernantoj kiuj lernas Esperanton."

Tamen ankaŭ prof. d-ro Rakuŝa klare akcentis: "Esperanto neniel volas forigi la lernadon de iu ajn fremda lingvo en iu ajn lernejo, ĉar Esperanto havas tute aliajn celojn. Ĝi povas esti nur amiko de fremdlingva instruado. Nin interesas la rolo de Esperanto en la kadro de ĉiuj lernejoj problemoj: kiel baza lingvo; kiel kompletiga lingvo; kiel sola fremda lingvo."

Ni retrovidu al la konferenco de 1922, kiam la angla direktorino raportis pri la kompara instruado, jen estis jam tre frue konstatite la rolo de Esperanto, kaj la formulado de Rakuŝa memorigas nin pri la termino 'orientiga lingvo'. Baza Lingvo estas por mi pli trafa kaj klara:

- la infano lernas kompare al la propra lingvo ĝeneralan gramatikon,
- jam lernas multajn internaciajn vortojn,
- samtempe pliprofondiĝas en la gepatran lingvon,
- la infano kutimigas al logika pensado,
- la infano ekvivas la kuraĝigan senton jam paroli fremdan lingvon kaj ni vidu la eminentan intelektan valoron.

Por la baza kurso sufiĉas du jaroj, dum la unua jaro oni apliku la rektan kaj poste la miksitajn metodojn.

Kolegoj ricevantaj tiajn preparitajn klasojn povos gratuli sin: la vojo al fremdaj lingvoj estas libera. Eble per granda klopodo mi povas malfiksi la ŝraŭbon uzante miajn fingrojn, sed se mi uzos ŝraŭbtenilon mi certe rimarkos la diferencon.

Ni sekvu Rakuša pri la kompletiga speco de Esperanto:

– la praktika aplikado de la nun instruata fremdlingvo kuŝas ankoraŭ en fora estonteco, dum

– la nun freŝa kono (pasiva aŭ aktiva) estas tuj aplikebla, nun posedas la infano la ŝlosilon por malfermi la tutan mondon,

– kia surprizo en la lernejo kiam alvenas freŝdataj maloftaĵoj por la geografia instruado,

– nun la infano povas senhonte skribi kaj paroli, ne timante terurajn erarojn; sed Rakuša avertas ke

– estas unu malfacilaĵo: la lingva nivelo de la infano. Kaj mi citas laŭvorte: “Esperanto kiel kompletiga lingvo de la instruata mondlingvo devas havi jam uzeblan nivelon de pasiva kaj aktiva scioj, certe ne iun altnivelan Esperanton, sed simplan, fundamentan Esperanton. Mankas al ni sufiĉaj spertoj, ĉu la instruado de Esperanto kiel baza lingvo donas la necesan lingvan scion.”

Kaj li dubas: Verŝajne ne. El la hodiaŭo mi persone aldonas: Li pravus, sed ni ne kulpigu la Esperanto-instruiston. Tiu ja restas nur privata persono kaj mankas la oficialigo de Esperanto!

La plimulto de la lernantaro ne daŭrigas la studadon de la fremda lingvo. Jen povus fariĝi Esperanto la sola fremda lingvo, ĉar la fragmenta scio de la lernita mondlingvo baldaŭ perdiĝas. Mi modifas iomete la dirojn de Rakuša tiurilate. La klasifikon en iu mondlingvo rajtigas la lernanton fari tion kaj tion. Oni ebligu ankaŭ la klasifikon de Esperanto, por havi poste la samajn kondiĉojn por fari tion kaj tion. Kaj mi emfazas, ke lingvaj instruistoj estas pedagogoj, kaj ili laboru kune je la bono de la infano, neniam dise, aliflanke ili estus efektive ne bonaj pedagogoj. La mondlingvoj estas bezonataj: lertaj sciintoj kaj parolantoj scias kial, sed same la Lingvo Internacia estas bezonata, lertaj sciintoj kaj parolantoj same scias kial.

Tamen, ni uzantoj de la Lingvo Internacia ne tro multe atendu de la oficialaj instancoj. Afabla kapjeso de iu politikisto ne multe helpas kaj ĝenerale dirite: politikistoj ne lernas Esperanton — almenaŭ ne en Germanio. Tamen mi devas esprimi mian respekton al viaj pedagogiaj instancoj. La 17-a de Aprilo la estraro de ILEI vizitis en Ljubljana la Ministerion pri Edukado, fako «instruado de fremdaj lingvoj en la elementaj lernejoj». La inspektoro, s-ro Peter Vinkler

respondecas la kadron de la nuntempa instruado de fremdaj lingvoj en Slovenio ekde la elementaj ĝis la superaj lernejoj, kaj Direktorino *Sinjinoro Selithar* detale donis informojn pri la fakultativa instruado de fremdaj lingvoj en elementaj lernejoj. Ni ankaŭ ricevis kajeran programon en kiu estas indikataj fremdaj lingvoj — inter ili Esperanto — libervole instrueblaj. Jam pretiĝis ampleksa programo por mezlernejoj — sur libervola bazo. Min persone neniam ĝefus la libervola bazo, se la samo validus por ĉiuj fremdaj lingvoj! Mi esprimas mian sinceran respekton, ĉar ĉe ni ne ekzistas tiaj programoj favore al Esperanto, kvankam teorie ni povas sub similaj kondiĉoj instrui ĝin sur ĉiuj lernejaj ŝtupoj. Sed oficiale enkonduki Esperanton estas por ĉiu ŝtata instanco ankoraŭ tro granda risko.

Via altesmata prezidento Tito je sia vivtempo avertis: La eniro de Esperanto en la lernejojn dependas de la premo de malsupre. Kio estas “de malsupre”? Sendube de la gepatroj kaj gelernantoj. Kiel forta estas tiu premo? Ĉu ili sentas la neceson de Esperanto en la lernejoj? Ĉu ie kaj iam gepatraro kaj gelernantaro energie postulis la enkondukon de Esperanto?

Via tre fama pedagogia konferenco sub la aŭspicio de Jugoslavia Nacia Unesko-komisiono okazis antaŭ 27 jaroj. Pluraj centmiloj da horoj estis ekde tiam denove investitaj en la laboron por la Lingvo Internacia. Dekmiloj da studhoroj estas donitaj. Gravaj lernejaj eksperimentoj okazis. Multaj novaj Esperanton parolantaj homoj aldoniĝis al nia strebado. Lingvo de netaksebla valoro estas en niaj cerboj kaj koroj. Lingvo kiu estas pli ol nur lingvo. Laŭ mia kono de Esperanto, de ĝia lingvistika strukturo kaj de ĝia evoluado dum preskaŭ cent jaroj, estas ne plu necese ke la Lingvo Internacia daŭre kaj konstante pruvu al si mem ke ĝi valoras, ke ĝi estas uz-ebla kaj bezonata! Ke ĝi estas lingvo! Kiu ankoraŭ dubas, tiu esploru mem!

Kaj ni, geinstruistoj, kiuj praktike aplikas Esperanton, ni ĉesu konstante serĉi novajn argumentojn. Ili ne plu estas novaj. Ili jam estis dum la centjara historio de Esperanto de iu ie kaj iam diritaj. Ni nun konkrete agu kaj provu atingi nian celon. Ni iru ĉiujn eblajn vojojn, ĉu politikajn, sociajn, sciencajn, publikaĵajn, ktp. Sed, kiel jam dirite: Neniu lingvoj estas rezigneblaj, ni bezonas ĉiujn. La kono de grandaj mondlingvoj estas el la plej diversaj kaŭzoj necesa

kaj bezonata. Tamen, ili ĉiuj havas unu malavantaĝon. Ni ĉiuj estas dependaj kaj ligitaj al siaj landoj, ŝtatoj, regionoj kaj de ili parolantaj homoj. Pro tio ni ja ankaŭ al kutimiĝis lerni nur tiujn, de kiuj ni havas la plej grandan profiton.

Sed neniu elektita mondlingvo plene kontentigas nin. Ekzemple la angla lingvo; ĝi havas vastan terenon kaj multajn parolantojn. Tute egale kiom da lingvoj mi lernas, ĉiam restas komunikaj truoj. En oftaj okazoj kaj situacioj mi ne havas la ĝustan lingvon je la dispono.

Por plibonigi la lingvajn komunikeblecojn ni proponas al ĉiuj instru- kaj edukaj instancoj — ĉie en la mondo kaj en ĉieaj lernejoj — jenan fremdlingvan lernsistemon, kaj mi prezentas ĝin per tute simplaj, kompreneblaj vortoj:

1. Post dujara vizitado de la lernejo, la infanoj eklernas dum du jaroj la Internacian Lingvon — devige — semajne po du horoj.
2. Post la kvara jaro, la infanoj komencas lerni unu aŭ du lingvojn kiuj gravas por la mondparto en kiu ili vivas.
3. Por ke la lernita Internacia Lingvo ne perdiĝu en la cerboj de la infanoj, ĝi paralele akompanu la fremdlingvan instruadon, kiel kompletiga lingvo.
4. Devas esti eble, ke Esperanto restu la unu sola lingvo, se poste en profesia vivo iu granda lingvo ne estas bezonata.
5. Geinstruistoj bezonataj por Esperanto estu edukitaj en universitatoj!

Tio estas la serioza kaj sincera rekomendo de la Internacia Instruistaro, kiu vidus en la oficialigo de Esperanto tute normalan aspekton en la sistemo de fremdlingva instruado.

Neniu perdus pro tio sian panon, sian laborloko, a. s. sian prestiĝon. Tute kontraŭe! Esperanto ja jam antaŭe forprenas de niaj lingvaj gekolegoj multajn didaktikajn kaj metodikajn zorgojn. Ni kune solvu la problemojn kiuj estas ligitaj al la fremdlingva instruado. Ni komune kaj kolegare agu por konvinki gepatrojn, gelernantojn, politikistojn. Tiam ankaŭ ni helpos niajn lernejojn instancojn plibonigi la nunan sistemon.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo	: Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstria Esperanto-Instruistoj) Rannachstr. 3 A-8046 Graz.
Belgujo	: Marc Demonty - Avenue des Missionnaires 39/B5 B-1080 Brussell.
Brazilo	: Elvira Fontes, C. P. 5888, Sao Paulo.
Bulgarujo	: Marin Bacev, Postkesto 1054, Sofio.
Danujo	: Lis Thune, Brembärvänet 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo	: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo	: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F. R. Germanujo	: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.
Grekujo	: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Hispanujo	: Andrés Martin González, Armengual de la Mota, 33, E-2, 4 ^o D, Malaga-7
Hungarujo	: Zsuzsa Barcsay, Bem rkp.25/b, H-1011 Budapest
Irano	: M. Saghafian Apt. 7N.34 24 th Street, Kuj Nasr Avenue, Teheran 14488
Israelo	: Josef Murjan, p.c.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Italujo	: Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Japanujo	: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Jugoslavio	: Miodgrad Stojanović, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.
Luksemburgo	: Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Malagasujo	: Eugene Raveloson, B. P. 1663 - 101, Antananarivo
Malto	: Anthony Mercieca - 20 Valletta Road - Qormi
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.
Nordameriko	: Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, Ca 93109 USA
Norvegujo	: Vidar Olaussen - Fakerlibakken 1 - 3000 Drammen - Norvegio
Nov-Zelando	: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.
Polujo	: Mg. Barbara Chmielewska, Pedagogia Komisiono de Pola Esperanto-Asocio, Ul-Jasna 6, PL 00-013 Warszawa.
Portugaliao	: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1 ^o Esq. Lisboa Marques.
Sanmarino	: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.
Sovetujo	: Johannes Palu, Sölme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV, Nikolaj Starodubcev, Poŝtrestante SU-3-340047 Doneck.
Sud-Afriko	: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sudakoreujo	: So Gil Su - Sodemun P. K. 59, Seŭlo 120.
Svedujo	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.
Venezuelo	: Esteban E. Mosonyi, Apartado 51500, Chacao, Caracas.

Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo	: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Pribram.
Ĉinujo	: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D. R.	: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Kubo	: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Singapuro	: Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.
Zairujo	: Antoine-Samuel Ngangu, B. P. 13, Lukala, Nkandu.

Stefan Maul
Ĵurnalisto, ĉefredaktoro de "Monato", FRGermanio

Francisco Mir
Fervoĵisto, Hispanio

Marianne Muller
Francio

Feiko Munniksma
Tradukisto kaj ĉefredaktoro de
"Internacia komerca-ekonomika vortaro
en naŭ lingvoj", Nederlando

D-ro István Nagy
Ekonomiisto, eksredaktoro de "Hungara
Esperantisto", Budapeŝto, Hungario

Prof. D-ro Paul Neergaard, Ak.Sci., Ak.E.
Instituto de Sempatologio por Evolulandoj
Vicprezidanto de Akademio de Esperanto
Membro de Honora Patrona Komitato de UEA
Danio

Edward Ockey
Sekretario de Literatura Komitato de SAT
Antaŭa redaktoro de The British Esperantist
Britio

Oton D. Pancer, D-ro (agr.ek)
Dipl. inĝ. agr., em. Universitata Profesoro
(Universitatoj Sarajevo, Zagreb), antaŭa
Prezidanto de Esperanto-Ligo de Bosnio
kaj Hercegovino kaj de Kroatio,
Jugoslavio

D-ro F. Pennacchietti
Prof. pri Semida Filologio en la
Universitato de Torino, Italio

D-ro Klaus Perko
Redaktoro de Internacia Jura Revuo
Sekretario de Internacia Esperanto-Asocio
de Juristoj, Vicprezidanto de ICNEM, Aŭstrio

Bertram Potts
Verkisto, Nov-Zelando

Teresa Massana Ráfols
Hispanio

Prof. D-ro Juan Régulo Pérez, Ak.Sci., Ak.E.
Universitato de La Laguna, Hispanio

Pietro Rizzo
Ombudsmano, antaŭa Prefekto, Italio

Reto Rossetti, Ak.E.
Verkisto, antaŭe universitata lekciisto pri
pedagogio al diplomitoj, honora membro de UEA
Britio

D-rino Käthe Rukavina-Danon
Kuracisto, FRGermanio

D-rino Adda Sakellaropoulou
Dentisto, Grekio

Prof. D-ro Miquel Sancho Izquierdo
Honora Rektoro
Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA
Hispanio

Maria Teresa Samsø
Fervoĵisto, Hispanio

Kjell Sellin
Lektoro, Universitato de Kopenhago
Danio

Vlado Sladeček
Ĉeĥoslovakio

Helmut Sonnabend
Rektoro, Prezidanto de Internacia Ligo de
Esperantistaj Instruistoj (ILEI), FRGermanio

Czesław Stykowski
Pollando

Prof. D-ro István Szerdahelyi
Docento en Universitato Budapeŝto
Honora membro de UEA, Hungario

D-ro Pier Marcello Tacconi
Italio

P.H.V. Terwisga
Em. kuracisto (internesto),
Vlieland, Nederlando

Jean Thierry
Prezidanto de Franca Esperanto-Instituto
Francio

Lis Thune
Ĉefinstruisto, Danio

Józef Toczyski
Iama estrarano de UEA
Ĉefdelegito de UEA, Pollando

Mag. Birthe Trærup
Adjunkto pri muziko en Universitato de
Kopenhago, Danio

D-ro Tyburejusz Tyblewski
Adjunkto ĉe Universitato Wrocław
Ĉefredaktoro de "Pola Esperantisto"
Pollando

Prof. Gaston Waringhien, Ak.E.
Verkisto, antaŭa Prezidanto de Akademio de
Esperanto, honora membro de UEA, Francio

Mag. F. Winkel
Urbestro de la komunumo Noordwijkerhout
Nederlando

Peter Zachó
Ĉefinstruisto, estro de "Eldonejo Perspektivo"
Danio

Miro Zavodsky
Ĉeĥoslovakio

Sven Ziegler
Juĝisto de la Supera Kortumo de Kopenhago
Antaŭe Ĝenerala Sekretario de UEA, Danio

D-ro Eugéne de Zilah
Profesoro licea pri filozofio
Vicprezidanto de Filozofia Asocio Tutmonda
Redaktoro de Simpozio
Francio

DEKLARO

OMAĜE AL

PROF. D-RO IVO LAPENNA

La 5-an de novembro 1984 Prof. D-ro Ivo Lapenna fariĝos 75-jara. La 8-an kaj 10-an de decembro 1984 estos la 30-jaraj datrevenoj de la konsultaj rilatoj de UEA kun Unesko kaj de la fama Rezolucio de Unesko favore al Esperanto, du el la multaj grandaj atingoj de Ivo Lapenna. E. Malmgren, la tiama prezidanto de UEA, nomis tion "unika servo al nia afero", kiu neniam estos forgesita, dum Reto Rosetti skribis en Esperanto de januaro 1955: "Ni salutu kun profunda danko-sento la genion kaj la titanan energion de nia protagonisto, Profesoro Ivo Lapenna". Kiel Kooperativo Literatura Foiro ĝuste skribis antaŭ nelonge, la Rezolucio de 1954 "malfermis novan epokon en la historio de Esperanto" kaj rezulte "nia mikrokosmo ekkonis veran renesancon, organizan kaj spiritan, kiu kulminis en la Jubilea Zamenhofa Jaro 1959", kronita per la decido de Unesko deklari D-ron L.L. Zamenhof "unu el la grandaj personecoj de la homaro" - rezulto de plia klopodo de Ivo Lapenna.

Ekde la fondo de Studenta Esperanto-Klubo en la Universitato de Zagreb en 1929, nur kelkajn monatojn post la ellerno de Esperanto en 1928, Ivo Lapenna restis intense aktiva sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj sferoj de la Esperanto-Movado, tiel ke en 1984 kompletigas 55 jaroj de lia seninterrompa, sindona kaj efika laborego por Esperanto. Tio estas pli ol duono de la tuta vivo de nia lingvo.

Esperanto havis kaj ankoraŭ havas grandulojn, sen kies valoraj kontribu-aĵoj ĝi neniam estus atinginta la nunajn maturecon kaj disvastigitecon. Tamen, malfacile estas trovebla kazo simila al tiu de Ivo Lapenna, kiu en unusola persono kunigas superajn intelektan multflankecon kaj erudicion, preskaŭ neelĉerpeblajn fizikajn fortojn kaj laborkapablon, neniam ŝanceliĝintan konvinkon pri la grandeco de Esperanto el lingva, socia kaj idea vidpunktoj, eĉ ne en krizaj periodoj, kiel la nuna. Verŝajne neniu post Zamenhof komprenis la signifon kaj potencialojn de Esperanto tiel tutece, kiel li. Ĝuste tio ebligis kaj ebligas al li disvolvi tiom da paralelaj kunligitaj agadoj. La siatempa reekfloro de Esperanto en pluraj landoj kaj la rimarkindaj sukcesoj en la konstruado de la moderna internacia Esperanto-Movado en la jardekoj post la Dua Mondmilito ŝuldiĝas al liaj konceptoj kaj grandparte, en multaj kazoj ekskluzive, al liaj personaj iniciatoj, laboroj kaj realigoj. Aldone al ĉio cetera, per siaj potencaj inspiraj oratoraj kaj erudiciaj prelegoj, kiel ankaŭ per sia unika teoria verko Retoriko, Ivo Lapenna levis la esperantlingvan parolarton al la plej altaj suproj de enhava profundo kaj forma beleco.


Estas bedaŭrinde kaj maltrankvilige por la estonteco de Esperanto, ke tia homo, eĉ multe pli ol la antaŭaj grandaj pioniroj ekde Zamenhof, estas viktimo de multjara kampanjo, celanta bagateligi lian grandiozan verkon, sed fakte malhonoriga por la kelkaj, kiuj ĝin gvidas, kaj tre malutila por Esperanto. Same kiel Prof. G. Waringhien en sia letero de la 17-a de majo 1976 al kelkaj Esperanto-periodaĵoj, kaj uzante liajn vortojn, ni deklaras:

Ni rigardas Prof. Ivo Lapenna kiel la indan postvenanton de tiuj grandaj esperantistoj, kiuj pleje progresigis la Movadon: Bourlet, Hodler kaj Privat; kaj, pli sukcese ol ili, li, dank'al siaj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro, altigis UEA ĝis la rango de la rekonitaj organizaĵoj internaciaj. Tial ni profunde indignas kontraŭ la hontinda kampanjo de kalumnioj, per kiu kelkaj oponentoj provis makuli lian honoron kaj subfosi lian prestiĝon.


La brila nomo de Prof. D-ro Ivo Lapenna, internacie rekonita scienculo en sia jura fako kaj ĉie alte respektata, pozitive markas tutan epokon en la historio de Esperanto. Ni dankas al li pro ĉio, kion li faris kaj plu faras por nia afero. Ni plene apogas lian plej novan iniciaton: digne celebri la 100-jaran datrevenon de Esperanto en 1987 per komunaj fortoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj.

Ni tutkore gratulas al Ivo Lapenna okaze de lia baldaŭa naskiĝtago kaj la pluroblaj datrevenoj. Ni deziras al li multajn pliajn jarojn da sukcesa faka-sciencia laboro kaj fruktodonaj poresperantaj agadoj.

La 5-an de novembro 1984



Juan Régulo Pérez
Profesoro d-ro



Paul Neergaard
Profesoro d-ro

Prof. D-ro Cyril John Adcock
Universitato de Victoria, Wellington, Aŭstralio

Dušan Adnađ
Redaktoro de "Voĉo de Handikapuloj", Jugoslavio

Jorma Ahomäki
Lernejestro, Finnlando

D-ro André Albault, Ak.E.
Prezidanto de Akademio de Esperanto, Francio

Prof. D-ro Stefanos Anagnostakis
Universitato de Thessaloniki
Vicprezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj Grekio

Mogens Rude Andersen
Lerneja vicdirektoro, Danio

D-ro Giordano Azzi
Inĝeniero, honora membro de UEA, Italio

K. Barković
Redaktoro de "Sennaciulo", Francio

N. Barthelmess
Antaŭa ĉefredaktoro de "Sennaciulo", Francio

Prof. D-ro Alessandro Bausani, Ak.Sci.
Universitato de Romo, Italio

Günther Becker
Antaŭa Ĝenerala Sekretario de UEA, FRGermanio

Roger Bernard, Ak.E.
Antaŭa Ĝenerala Sekretario de Akademio de Esperanto, Francio

D-rino Marjorie Boulton, Ak.E.
Verkisto, Britio

André Bourdeaux
Francio

Chen Yuan
Direktoro kaj ĉefredaktoro de The Commercial Press; Vicprezidanto, The Publishers Association of China; Membro de Chinese Writers' Association PRĈinio

P. Albino Ciccanti ofm
Pastro, Italio

Prof. D-ro Jonas Dagys, Ak.Sci.
Ŝtata Universitato de Vilnius, Litovio, Sovet-Unio

R. Dalton
Solicitoro, LL.B., F.C.I.Arb.
Britio

Prof. Catina Dazzini
Italio

Prof. D-ro Mario Dazzini
Ĝenerala Sekretario de ILEI, Italio

Rafael Devis
Fervojisto, Hispanio

W. Downes, Ak.E.
Pastro, Britio

Mag. Isaj Dratwer
Bakteriologo, Israelo

D-ro Ladislao Dubravszky
Hungario

Rüdiger Eichholz, Ak.E.
Eldonisto, Kanado

Prof. D-ro Lionel Elvin
Em. Direktoro de la Instituto pri Edukado de la Universitato de Londono, antaŭe Direktoro de la Departemento pri Edukado, Unesko (1950-56), Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, Britio

Prof. D-ro Helmar Frank
Universitato de Paderborn
Fondinto de Eŭropa Klubo, FRGermanio

Pierre Gaborit
Skulptisto kaj pentristo, Danio

Claude Gacond
Direktoro de Kultura Centro Esperantista, Svislando

Prof. inĝ. Ivo Godek
Pens. ĉefo de torent-serv., kunfondinto de Studenta (Akademia) Esperanto-Klubo en la Universitato de Zagreb, Jugoslavio

Angel Gonzalez
Fervojisto, Hispanio

Irvine Goulding
Juĝisto de la Supera Kortumo de Anglio kaj Kimrio, Britio

Marti Guerrero
Fervojisto, Hispanio

Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev, Ak.E.
Vicprezidanto de Akademio de Esperanto, Herder-laŭtreato de la Universitato Wien; Bulgario

Salvador Gumá
Hispanio

Ralph Harry, A.C., C.B.E.,
Ambasadoro, Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, Aŭstralio

Luis M. Hernandez Yzal
Hispana Esperanto-Muzeo, Hispanio

H.W. Holmes. O.B.E.
Iama Vicprezidanto kaj Honora Prezidanto de UEA Britio

D-ro Walter Hube
Estro de Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, Aŭstrio

D-ro A. Hübner
Prezidanto de la Aŭstria Societo de Ludwig Wittgenstein, Aŭstrio

D-ro Erik Høg
Lektoro pri astronomio en Universitato de Kopenhago, Danio

Clovis Idelon
Antaŭa urbestro, Regiona Konsiliano de la Drôme Francio

Eizo Ito
Prezidanto de EPA de Oomoto, Japanio

Vladimir Kalivoda
Ĉeĥoslovakio

Inĝ. J.O. de Kat
Antaŭa scienca ĉefkunlaboranto de la Delfta Teknologia Universitato, Komputilisto Nederlando

Torben Kehlet
Eldonejo TK/Stafeto, Belgio

Sirkku Koivu
Skulptisto, Finnlando

Nevan Kovačić, Dipl.jur.
Estrarano de TEJO, Jugoslavio

Hugo Kraus
Vicprezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio Redaktoro de AERevuo, Aŭstrio

P. Bo Larsen
Diplomita ekonomiisto, Danio

Dipl. mat. Heinz Dieter Maas
Esploristo en la Universitato de Sarlando Saarbrücken, FRGermanio

Prof. D-ro H. Marinov
Supera Ŝtata Instituto de Ekonomio kaj Financoj Sviŝtov, Bulgario

19-a Internacia Konferenco de ILEI: 22-29 julio 1985

Loko:

Kungälv, Svedujo. Urbeto 25 km norde de Gotenburgo, en la okcidenta parto de Svedujo. La urbo situas ĉe la rivero Göta älv, ĝuste tie kie la rivero disiĝas en du branĉoj. La urbo havas ĉirkaŭ 30 000 enloĝantojn.

Ejo:

La Nordia Popolaltlernejo (Nordiska Folkhögskolan). – Adreso: Box 1001, S-44 25 Kungälv, Tel. 0303/10945. – La lernejo situas sur monteto en natura parko. – La lernejo havas:

1. Centran domon kun manĝejo, granda salono, pluraj klasĉambroj, komfortaj komunaj ejoj, lifto, oficejo, biblioteko k.t.p.
2. Apartajn loĝdomojn. Ĉiu domo havas lokon por 8 personoj. Ĉiu domo havas unu dulitan ĉambron kaj ses unulitajn ĉambrojn, komunan ejon, kuirejton, du komunajn necesejojn kun duŝo. La loĝdomoj estas tute modernaj.
3. Bonan parkejon.

Manĝado:

Matenmanĝo, lunĉo, vespermanĝo. Kun manĝaĵo vi ricevos akvon aŭ lakton. Vi povas kontraŭ pago ricevi bieron aŭ mineralan akvon. Vino ne estas aĉetebla. – Povas okazi ke ni iun vesperon ricevos kafon. – En la lernejo troviĝas aŭtomata servo por kafo kaj refreŝigaj trinkaĵoj.

Ekskursoj:

Ni intencas organizi ekskurson al la mara insularo boate. Pro tio necesas ke vi montru vian intereson per krucsigno sur la aliĝilo. Ni devas esplori la eblecojn organizi la aferon per boato, alie ni uzos aŭtobuson. Ni ankaŭ ŝatus aranĝi viziton en Gotenburgo.

Vojaĝeblecoj:

Al Gotenburgo vi povas facile veturi per trajno, aviadilo, ŝipo aŭ propra aŭto. Rapida kaj bona aŭtovojo kondukas al Kungälv de Gotenburgo. Inter la du urboj aŭtobusoj plurfoje dum la tago veturas. La haltejo en Gotenburgo estas sur la placo antaŭ la ĉefa stacidomo (Nils Ericsson platsen).

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (I.L.E.I.)

19-a Internacia Konferenco

Kungälv (Svedujo) — 22-29 julio 1985

(Nordiska Folkhögskolan) — Nordia Popolaltlernejo

I.L.E.I.

Dazzini, Mario
Casella Postale 22
I-54100 Massa (Italujo)
Tel. 0585/41756

L.K.K.

Bertil Andreasson
Södra Rörum pl. 455
S-242 00 Hörby (Svedujo)
Tel. 0415/50152

ALIĜILO

Familia nomo: Antaŭnomo:

Profesio: Naskiĝjaro:

Strato: Nro:

Poŝta kodo: Urbo:

Lando: Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo (edzo,

edzino, infanoj):

Bonvolu krucsigni:

unulita ĉambro vegetarano

dulita ĉambro kune kun:

Interesas min partopreni:

komencantan (preskaŭ) esperantan kurson dum la konferenco

tuttagan ekskurson kontraŭ kroma pago (nur esploro, ne aliĝo).

Aliaj deziroj:

KOTIZO (loĝado, manĝado, konferencaj kotizoj): **1700 svedaj kronoj**
(Ekskursoj estos aparte pagitaj kaj aliĝitaj dum la konferenco).

Mi sendas la aliĝilon al L.K.K. (vidu supren) kaj la kotizon al:

Bankkonto numero: 5612 33 031 71
Skandinaviska Enskilda Banken
S-205 20 Malmö (Svedujo)

aŭ al:

Poŝtgira konto numero: 68 21 17 - 7 (Stockholm)
I.L.E.I. Södra Rörum pl. 455
S-242 00 Hörby (Svedujo)

aŭ per internacia poŝto-mandato al la L.K.K.

[Dorse de la enpagilo, menciui nepre: Familia nomo kaj antaŭ-
nomo. – Post ricevo de la kompleta pago vi ricevos la konfirmilon.]

Dato: Subskribo:

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj/I.L.E.I.
Asembleo de ILE! en Kungälv/Svedujo**

**English yes — Esperanto jes
Lingvoj kiel partneroj**

Internacia Konferenco de la 22-a ĝis la 29-a de Julio 1985

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Jugoslavio.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizo

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussel.
FIME.M Fédération Internationale de Mouvements d'École Moderne - 35 Avenue
Jottrand 1030 Bruxelles - Belgique. Tel. 02 277 49 36.
ICEM Esperanto - I, rue Galissonnière - Le Pallet - F - 44330 Vallet - Francio
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Pa-
ris.
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (30 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon
de IPR.

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj
aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de
Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum
pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro